

& La lasta fablo de Ezopo:

< Rekante 20 el 29 batoj por strofo, entute 377 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo islandaj de Olav Rajdistrozo, movante versojn inter strofoj '1-'2 kaj '5-'6 pro rimoj.>

(#Melodio:

<1,6:29> (/soso doso sola soso; mifa so mire do; soso soorelmi fami do[do;mifa] soso sofa milso; soso lalalaa sofa mire do dore; mire mimifaa soso lafa mi re do o)×13)+

(&Strofoj:

'1 Estis kamparano aĝa.

(×; **Se erar', li en star' ;**)

En la kabanet' vilaĝa

(×; **Kaj la ruĝa brulis fla2m'. ; Milde ŝarĝon li metis sub la montkruto ; milde ŝarĝon li metis sub la monta krut'.**)

'2 li jam manĝis multajn bulbojn,
sed neniam vidis urbojn,

'3 do li petis la domanojn: “Mi jam manĝis multajn panojn

'4 sed ne lasis for ĉi neston, donu al mi rajdobeston.”

'5 Nu, azenon li ricevis, sin en ties selon levis,

'6 kiu jam kaduke aĝis, al la urbo ekvojaĝis.

'7 Rajdis sur la lanta besto, sed atakis lin tempesto.

'8 La azeno time prancis, la aĝulon ĝi balancis,

'9 fine levis sin subite sur la postajn krurojn, puŝis

'10 lin en foson. Tie kuŝis la povrulo, mortvundite.

'11 Kaj li veis, jam apenaŭ spiretante. “Se almenaŭ

'12 mi de rajdĉeval' bonrasa mortus, aŭ de mul' tenaca,

'13 kaj ne de azen' nazmuka, malkuraĝa kaj kaduka!”